



(Nova Serio)

Redakcio-Administracio:

BOX 731F, ELIZABETH-STR., P.O., MELBOURNE (AŮSTRALIO).

Abono (por 10 numeroj):

AŮstralia: 4 ŝilingoj kŝj 6 pencoj; Ekster AŮstralia: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: REGINALD BANHAM, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj. :: :: :: Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

Ce ĉiuj poŝtmandatoj kaj monbiletoj igu S-ron Roy Rawson la pagato.

N-ro 150 (13th Year).

MELBOURNE (AŮSTRALIO).

31 MARTO, 1933.

NACISMO, KAJ ESPERANTO.

En la nuna diskutado pri reorganizo de la Esperanto-movado, restas preskaŭ netuŝita sufiĉe grava faktoro—la influo de la naciismo, perturba forto ankoraŭ inter ni. Utile estus studi ĉi tiurilate la enhavon de la oficiala organo de la U.E.A. kaj tiujn de la diversaj naciaj Esp-aj organoj, kiaj ili estis dum la militjaroj.

Tiu de "Esperanto" (U.E.A.), sub redakto de H. Hodler, estis karakterizata de alte supernacia, konstrueme neŭtrala spirito. Tio estas precipe vera pri la pensriĉaj fruntartikoloj verkitaĵoj de tiu vastanima Eŭropano. Komparu la jenan "ŝeron," kiu aperis 15.9.18 en "The Esperanto Monthly," Londono: "Antaŭ kelkaj jaroj Germano montris al Dana vizitanto la domon de Schiller en Weimar.

Jen la domo de nia nacia poeto, diras la Germano.

Internacia poeto, ĉu ne? diras la Dano, ĉu li ne verkis La Virineto de Orleans por la Francoj, Vilhelmo Tell por la Svisoj, Mario Stuart por la Skotoj, kaj La Novezdino de Messina por la Italoj?

Sed ĉu li ne verkis ion por ni Germanoj?

Certe, respondis la Dano, li verkis La Rabistojn."

La ofendo estas malikaŝa. Tia mala-

mikea konduto de "ŝamideanoj" tre povas semi dubojn pri la efikeco de la "interna ideo," kies rebrilaĵo samnumere troviĝas en la jena bela aserto:—"It is to the work of Zamenhof that the world must look for the common tongue of the League of Nations. It is a tongue, that was invented not only to prevent war, but to make war impossible, because its author intended it to be used to show men that they are brothers" (!) k.t.p. En la sama gazeto 15.4.18 ankau estas reverko de la Ekzercaro de Zamenhof, destinita por soldatoj. Rekruto ne estas matura soldato (Infano ne estas matura homo); La kanono jam ne pafas (La infano jam ne ploras). Kion Zamenhof opinias pri tia? Kiel konate certaj germanaj kaj francaj Esp-istoj febre laboris tiutempe ĉe siaj registaroj, celante akceptigi Esp-on en landaj militpropagandaj rondoĵoj, kun parteta sukceso.

En la nuna momento regas akra naciismo en la Eŭropaj nacioj. Italando, Hungaroj, Germanlando sidas sub diktaturoj. U.E.A. ne plu havas membrojn en Italando. La itala organo "L'Esperanto" (n-ro 16) kriis sub foto de Mussolini la vortojn de tiu regulo: "La ordona vorto estas jena—marŝi, konstrui kaj, se necese, batali kaj venki." Ĉu ankau la germana land-organon perdis sian sendependecon pro

lastatempaj politikaj eventoj?

Male, dum la milito kaj ankoraŭ nun la U.E.A. fidele funkcias ekster naciaj kadroj, senpartie, altruiste, akurate. Ĝi eltenis sukcese la terurajn batolojn de l'Militodio. Ĉu nova organizformo, konstruita sur la marĝo de landaj organizoj tro facile flamiĝataj de la partikularismo, povus transvivi similan?

(R.B., 4.3.33)

OFFICE-HOLDING IN A.E.A.

We have received a letter from Mr. Henry Byatt, of Perth, who informs us that the recent voting for positions of President and Secretary of the Australian Esperanto Association was in favor of Mr. F. J. Simon and Miss E. B. Carrick respectively. He points out that the work of the Association is seriously interfered with owing to the short term for which officers are elected, viz: one year. Nominations were called in September, 1932, and results of the ballot came to hand in February, 1933; about five months of the year were thus occupied in getting officers elected, leaving only seven months for actual work. Owing to Australia's immense distances, the time occupied in mailing and remailing correspondence is so great that little can be done. He firmly holds that all officers should be elected for not less than three years, and points out that

the result of a vote taken last year showed only one group not in favor of a three-year term.

RADIO COLUMN.

Speakers are requested to send in particulars of any broadcasts arranged in ample time for publication in this column.

Esperanto lessons will be broadcast from 31.0 at 7.45 p.m. on the dates mentioned below. An anecdote will be read at the end of each lesson to enable students to check their pronunciation.

April 15th.—Mi kaj mia edzo dum edziĝa vojaĝo cirkaŭis la mondon.
—Cu vi vizitis Romon?—Mi ne scias. Mia edzo aĉetis la biletojn por la vojaĝo.

April 29th.—Cu vi ne laciĝas respondante al senescaj demandoj?—Jes,—respondis la policano,—mi jam respondis al tiu demando dudek fojojn hodiaŭ.

KRONIKO.

Masterton, N.Z.—La klubo funkciis la tutan jaron, dum kiu la prez-o, s-ro A. Dewar, D.B.E.A., kaj f-i-no Ibbetson instruis la lingvon. La membraro estis dudek ses (ok pli ol en la antaŭa jaro); la meza nombro de ĉeestantoj ĉe kunvenoj estis dek ses. En 1932 la Masterton'a klubo havis pli altan anciferon ol kiu ajn alia klubo en Nov-Zelando.

La 4a kongreso de la NZEA (Decembron) en Masterton kaŭzis fortan impreson. Ni ricevis kvin novajn membrojn pro tio.

Du anoj forlasis la urbon kaj klopodas starigi Esp-an klubo en alia urbo. Unu membro gajnis la BEA—diplomon. Pormese de la YMCA (kristan-asocio de junviroj) la klubanoj starigis bele grandan duflankan devizon ekster la kunvenoj. Ĝi vekis multan admiron ĉe la kongresanoj. Sur la kongreseja muro estis alia deviztuko longa dek kvin futojn, kies unu vorto, Bonvenon, ĉiam salutas ĉiujn.

La Coburg E. Grupo kunvenis je la 12a de januaro por daŭrigi sian studadon post la kristnaska kaj novjara libertempo. Ĝi bone progresas; 8 novaj lernanto aliĝis en la du monatoj pasintaj.

Ni estis favoritaj per vizitoj de s-ro Trouard, el la grupo ĉe Bendigo, f-i-no McKay, el Melbourne, kaj s-ro Thomson. Bedaŭrinde nia eksprezidanto, s-i-no Hintze, dum tri semajnoj mal-

sanas. Ĉiuj grupanoj esperas, ke ŝi rapide resaniĝos.

TO OUR SUPPORTERS

Thanks for the following:—Mr. W. T. Middlebrough, 9/-, Feb., '34; Miss Bostock, 2/6, Dec., '33; Miss A. Winhall, 5/-, Jan., '34; Mr. F. M. Pavlinovich, 5/-, March, '34; Mrs. H. Aspin, 5/-, Feb., '34; Dr. F. J. Williams (Sub. and Adv.), £1/7/6; Auckland Esperanto Society (sub.), 10/-, May, '33, (adv.) 11/-, May, '33; Coburg Esperanto Group (adv.), 5/6; Mr. W. F. Holmway, 4/6, Feb., '34; Melbourne Esperanto Club (subs.), £1/14/-, (adv.) 5/5, (sales) 16/5.

INAUGURAL MEETING OF A.L.E.A.

An enthusiastic gathering representative of various Esperanto groups in and around Melbourne on 28th February last formally established the Australasia Labora Esperanto-Asocio.

It was regretted that late publication of "La Suda Kruc" (Feb. issue) prevented the notice of that meeting reaching many who possibly would otherwise have been present.

A letter explaining the aims and organisation of the Association is being forwarded to all Clubs, Societies, and individuals interested in Esperanto, in the hope that they will link up with this new venture in the interests of the International language and of the Australian workers generally.

The next meeting in Melbourne is to be held on April 10th at 8 p.m., in the Temperance Hall, Russell St. At this meeting a provisional constitution prepared by the Committee will be submitted. All interested are invited to attend.

The Secretary is communicating with groups in the other states, also New Zealand, inviting them to form sections of the A.L.E.A. Affiliation with the A.L.E.A. will in no way encroach upon the activities of existing Esperanto societies. A distinctive aim entitles the A.L.E.A. to a separate existence, but it earnestly desires the co-operation of all kindred organisations.

B.E.S. ADRESARO!

By last mail I received a further small supply of this finely produced "aid to correspondents." This, the Jubilee (10th year) number, contains over 1100 addresses from over 40 lands. It can be had from La S.K. on receipt

of four reply coupons. This means of payment is the only practicable one, owing to exchange difficulty. (Agent.)

THE CLAIMS OF ESPERANTO. (Reprint of leading article in "The Wairarapa Age," 6/1/33.)

At the fourth New Zealand Esperanto Congress, held at Masterton last week, interesting proof was afforded that the claims of the international auxiliary language are gaining steadily wider recognition in this country. At a public meeting held in connection with the conference, a resolution was passed calling upon the Government to approve the official teaching of Esperanto in the schools of the Dominion, "as had been done advantageously for many years in a number of other countries." This resolution, and others like it, are likely at the moment to be of little avail. The overshadowing aim in educational administration is to cut costs and no new expenditure of any kind is likely even to be considered by the Minister of Education and his Department. It seems to be well established, however, that in making no provision for the teaching of Esperanto, our State educational authorities are lagging behind the times and are withholding instruction of undoubted value even from the most severely practical standpoint.

The claims of Esperanto are based upon the fact that it has definitely outpaced and outclassed its competitors for adoption as an international auxiliary language, and in doing so has undergone, in many countries and in varied conditions, an extended working test which has proved it to be well fitted to serve its intended purpose—that of a neutral language capable of spreading throughout the world and providing an efficient and convenient means of communication between nations, without intruding upon the national life of peoples and without any attempt to supersede the existing national languages. It already seems certain that the universal adoption of Esperanto as a medium of business communication between the trading communities of different nations will be only a matter of time. Already the international language is used very extensively in this way. At a broader view, even more important possibilities are raised by the increasing use of Esperanto in international communication, both official and unofficial. The use in common of an efficient language obviously will do much to facilitate that understanding between peoples alien to one another on which the peace of the world largely depends. It is self-evident that in a country like New Zealand, the complete neglect of Esperanto in schools maintained by the State can only be temporary and must be attributed, even in these days of enforced economy, to a failure to perceive the significance—economically as well as at a larger view—of develop-

ments in the use of the international language that are proceeding inevitably and in all human probability will be expedited greatly in the near future.

NIA POŬTO.

J. E. en W.—Bedaŭrind e ni ne povas presigi viajn strotoĵojn. Vidu klarigon sur p. 2 de Oktobra n-ro.

B. T. en L.—Jes, Zinoviev, la fama bolŝeviko kaj laŭaserta aŭtoro de la monde konata "letero" al la brita lab. partio, estas la sama homoj, kies nomo aperis en la dediĉparolo en la franca Esperanta vortaro de 1907, laŭ informo de "Helvetia," Occident tal-organon. "Kuraĝa laboranto por Esp-o de la unua horo, li fariĝis ĉefo de la rusa revolucio, kaj unu de pli okupigas pri Esp-o."

Julie S. en Pr.—Via artikolo aperos kiel eble plej frue. Dankon.

A. C. -T. en N.Z.—Dankon. (1) Timinde estas ke lastatempaj eventoj en Germani, grave influos sur la Kolnan kongreson. (2) Ankaŭ multaj el la nune proponataj novvortoj estas el germanaj fontoj. (3) Jes, la cifero donita de BEA pri la nombrado de Espistoj ŝajnas tre malalta. Ĝi estas kompreneble nekompleta. (4) Viajn plenadojn mi atentis.

Al Do. en W.—

En la korekta frazo "tiom kaj tiom da milionoj da kilogramoj da sukero" "Heroldo de E." proponas ŝanĝi "milionoj da kilogramoj" al "kilogram-milionoj" (eventuale: milionkilogramoj), do, "tiom kaj tiom da kilogram-milionoj da sukero."

Al B. en M.—

La spiritoj jam informis vin, ke "la projekto—estas preskaŭ perfekta. Esperanto ne estas tia." Ni opinias ke en aferoj lingvosciencaj oni devas turni sin al la lingvistiko aŭ almenaŭ al sana rezono. Sin turni al la spiritoj estas riske, ĉar oni tre povas per tio ekkomunikiĝi kun tiu fantasta spirito, kiu havas plezuron mistifikadi.

MALMULTE KONATAJ VORTOJ DE ZAMENHOFF.

(N-ro 6)

[Respondo de d-ro Z. 1913, post kiam li en Bern estis akceptinta oran medalon kaj bukedon.]

"Esperanto jam ne plu dependas de iu sola homo, nek de iu sola aro da homoj, por sia sukceso. Homoj povas veni, kaj homoj povas iri, sed Esperanto daŭrigos ĝis la idealo pri internacia lingvo, kuniganta ĉiujn popolojn per ligo de komuna kompreno, estos atinginta sian venkan realigon por la bono de la tuta homaro."

RECENZ(ET)OJ.

HOMOJ SUR LA TERO, originalo de Stellan Engholm. Eldonita de "Literatura Mondo," Budapeŝto. Pĝ. 201, prezo 1 dol. bndita 0.70 broŝurita.

Leginte ĉi tiun romanon, kiu cetere gajnis le 1931 literaturan konkurson de "Literatura Mondo," mi supozas ke la aŭtoro intencis montri per ĝi, kiel sencele, monotone kaj ĉiutagece stagnas la grizaj vivoj de la terhomula plimulto. Se jes, li perfekte trafis. La finaj jaroj de l'maljuna Kristoforo forĝutas tra kvar ĉapitroj dum li aĝultule planas, pribabilas kaj gapas la konstruadon de nova stalo; en la dua parto lia filo Kristoforo idiotas, drinkas kaj forĉobdas la havon, gravedigas la servistinojn kaj ignoras sian vir-idon; en la tria parto multe temas pri la fantazia influo de la mortinta avo sur ĉi tiun junan Eskil, lia nefelicia enamiĝo, forvojaĝo alirbojn kiel metlernanto, kaj lia reveno kun akompana familio ĉirpado. Ĉu vere pli? Jes, la figuro de la efektiva "heroino," Kajsa la ĉiamokupata, klarvidanta la escencrilato de la Homo al la Tero, kaj flegme batalanta konservi al si kaj siaj jarjar intencojn kun tiu ĉi fonto de ĵuŝtro. Bele malhela bildo de nordlanda kamparino.

Sed dirive, mankas en la verko tiuj literaturaj elementoj kiuj katenas la legantan spiriton, ĉu filozofiaj, ĉu psikologiaj, ĉu simple aventur-rakontecaj. Liaj observoj ŝajnas supraj, ne penselertaj. Ekzemple, sur p. 125: "Se ni nur vivus en gusta maniero, ĉe la laboro farigus kvazaŭ ludon, kvazaŭ gaja festo al ni ĉiuj." Neniu disputos tion, sed multaj disputos pri tio, kio estas "la gusta maniero." Sur 128 "Pri iliaj la knaboj de Grandtoreto" propraĵ vivinstinktoj ili ne estas kulpaĵ. Tiu aserto, akceptita de la homoj ĝenerale, renversus la socion.

Lingvaj punktoj: 10, "K. ne kaŝis sian lumon." Tiu cito el la Nova Testamento ne estos komprenata de ne-kristanaj popoloj. 50, "li molkure venis" (?); 55/6 (8a): 128/6 okuloj (oreloj); 128 timda (?); 135, alie (alie, aŭ aliloke); 136, ĉeraj (okandajn) rifnuŝuletoj?; 155, "li ne povis helpi, li sentas sin fremda antaŭ ili." Stranga anglismo: Legu (li ne povis ne senti sin...); 172, "mortigi la lastan banklibron" (?); 173/1, kontrolon (sin-region); 183, "oni ĝuste tagmanĝis" (oni ĝuste tim...); 188, "metis la vizagon dense al la lia" (... tre apude...); tralibra uzo de "korto" en senco de "terposedo," "bieno"; "sen-tiĝan ĥuron" (?).

Malgraŭ tiuj kaj aliaj diskutindaj formoj kaj parolturnoj la lingvaĵo de Engholm estas larĝrigarde bona. Sed ĉu verkon de ĉe tre lerta Esp-isto oni presu nur tial ĉar li estas tia?

Esperanto-Deutsch Vortaro de la L.E.A. (Laborista Esperanto Asocio), Dirksenstr. 42, Berlin C25. Pĝ. 143, prezo unu ŝil. Ĉi tiu prilaborja, des-tinita ĉefe por "malburguloj," estas

kelkpunkte rimarkinda. Unue en tio ke ĝi aprobas principon de apokopado (t.e., elizio de parto de la radiko), "responde al la lingvovirimo de Esp-o." Ekz. but(e)ro, vet(e)ro, reg(u)lo, komit(at)o, sekretar(i)o, karik(at)urjo, Sed estus nur konsekvenco uzi plue kap(e)lo, kanib(a)lo, kand(e)lo. De mi dirande estas, ke ĉi tiu procedo rekte minacas la unuecon de la lingvo, kaj precipe ĉe la oficialaj radikoj, ekz. gra(j)no, ĝi estas nepre malkonsilinda.

La kompilitinto staras sur iomete pli firma grundo sanktante la adverbiajn formojn ĉir(e), ant(e), presk(e), k.c. Ili atentigas, ke Zam. en 1894 proponis la e-formojn en sia reformprojekto, kaj ke la Esp-a Akademio voĉdone permesis uzon de tiu formo ĉe la adverboj. Sed ĉi vortaristoj ne mencias ankaŭ la faktan, ke en la sama jaro (Orig. Verkaro p. 512) Zam. skribis "Vi scias, kiel longe mi batalis kontraŭ reformado... Sed bedaŭrinde la afero ne dependas de mi." Agnoskande estas, ke la Esp-a popolo ne uzas la suprajn formojn, aŭ se jes, nur etskale kaj interne de klare markitaj limoj.

Kial strangaĵoj kiam antikvio, redakcio, anstataŭ antikveco, redakcio? La derivaĵoj "deflorigi," "distiaŭzi," "disaŭdigi" devas aĉi respektive sub "flor," "taŭzi," "aŭdi."

En vortaro celante prolektan rondojn mirige estas trovi multajn balastajn formojn kiaj mediano, micelo, minio, miriapo, dum malestas vortoj oftege uzataj sur la paĝoj de eldonadoj de Ekrelo (la proletliteratura eldonejo)—raĵono, minor(i)taĵo, defi, klertkala k.m.a.

Neologismoj svarmas. Spaco mankas por pritrakti tiun senfinan demandon. Interesaj tamen estas rubila, pubera (sekmaturo); holi (irpreni); kavalo (rajdevaloj); fletri (zorge maĉadi); vringi (kuntordi).

Studinte ĉi cetere valoran volumeton, mi ankoraŭ ŝatis, ke inter la Esp-istaro ekzistas instinkta prudento sufiĉe komuna por malakcepti la kapriolojn de nesana troevoluismo.

(Robo.)

Kalendaro de Internacio de Proleta Esperantistaro: 1933.—Meritas vendon ĉe ĉiu deziranta pluan disvaston de nia lingvo, precipe inter la proletuloj. Poŝformata, belpreca, por-nova spaco ĉe ĉiu tago, memorindaj datoj tuŝantaj la klasbatalon, listo de proletorganizaĵoj kaj-organoj, kaj pikaj artikoloj—jen riĉa kompilo en eta formo. Prezo du resp. kuponoj ĉe I.P.E., Postfach 2; Berlin C25.

"La Esperanta Libroaĉetanto" estas 16-paĝa faldfolio pri la nova mistera organizaĵo, kiu dum kelk monatoj lastatempe instigis la interesemon de ĉiulandaj E-tistoj. Kio estas AELA? Skribu al The Manager, La Suda Kruco, Box 731 F., P.O., Elizabeth-st., Melb., kaj per tio ricevu senpaga ĉi tiun presaĵon, kiu plene klarigas pri la Asocio de Esperantaj Libroamantoj. (L.T.)

EL RUSA PLUMO.

(Ĉi monate ni donas skriberon de la fama veterano Esp-o, V.N. Devjatnin. Ĝi estas mallongigita el tre interesa artikolo en la tria kajero de "La Nova Etapo," Moskvo. Havanta aĝon pli ol 70-jara Devjatnin ankoraŭ fervore laboras por Esp-o. Li nun loĝas en Kiev, partoprenante tradukadon de la verkoj de Lenin en nian lingvon.)

"... Kiel strangaj estas la homoj! Dum miloj da jaroj ili parolas per mil diversaj lingvoj, toleras diversajn malfacilaĵojn, eĉ malfacilaĵojn, ne komprenante unu la alian, kaj tamen neniam maniere povas elekti ian lingvon, kiu estus lingvo komuna, egale komprenbla por ĉiuj homoj de la tuta mondo. Kunvenas nur tri personoj de diversaj nacioj, ekzemple, franco, germano kaj ruso, kaj volas envortigi la ideon pri domo,—kaj kiel ili esprimas ĝin? Unu diras "maison," la dua "Das Haus," la tria "dom." La ideo ja estas komuna, la sama por ĉiuj nacioj, por ĉiuj gentoj,—kial do oni ne povas esprimi ĝin per sama vorto? Ne nur oni povas, sed eĉ oni devas. Sekve devas esti akceptita aŭ elpensita komuna "tutmonda lingvo," por ke ĉiuj homoj loĝantaj sur la terĝlobo, komprenu unu la alian ...

"Tiel pensis mi, gimnaziano de la VI klaso, preparante min al la ekzameno kaj studante la latinan laŭ la sintakso de fama Kuhner ...

"Pasis ses longaj jaroj, de kiam mi lernis la lingvojn latinan, grekan, francan, germanan ... Kaj kiajn sciojn ricevis mi de tiuj ĉi fervoraj studoj? 'Quo usque tandem, Catilina ...' Ni ja parkere lernis tiun ĉi ciceronaĵon ... parkere!

"Ĉu vi komprenas, miaj karaj gelegantoj, kion ĝi signifas? Kiom da strebo de niaj junaj spiritaĵoj fortoj ni uzis, por kompreni la sagacajn parolturnojn de tiu ĉi eminenta roma oratoro! 'Accusativus cum infinitivo,' 'Nominativus cum infinitivo,' 'Ablativus absolutus,' 'Ablativus tempore ut finale,' 'Oratio recta,' 'Oratio obliqua' ... 'absque, a, ab, abs, de, coram, clam, cum, ex, e ...' k.t.p. senfine.

"Tiu ĉi idiotaĵojn mi ankaŭ devis lerni parkere. Mi ankoraŭ ĝis nun, post pli ol 50 jaroj, memoras ilin. Kion da tempo, da laboro, da energio; da fortoj estis eluzitaj—kaj pro kio? ... Kaj la greka, la franca, la germana, la antikva slava lingvoj kun iliaj multenombraj komplikitaj reguloj, kun es-

ceptoj, esceptoj el esceptoj, kun iliaj etimologiaj kaj sintaksaj labirintoj, ilustritaj per diversaj prozaĵ kaj versaĵ ekzemploj, otte tute sencencaj, malspritaĵoj ...

(Nun sekvas lia konatiĝo kun Volapuk, lia seniluziigo pri tiu fiaskinta provo.)

"... Venis la epokfaranta por mi 1891 jaro. En majo de tiu ĉi neforgesbla jaro, pasante unu fojon tra la stratoj de Vilno, kie mi tiam loĝis, mi ekvidis en la librovendejo de Sirkin malgrandan libreton en la rusa lingvo kun la titolo (ruslingve) 'D-ro Esperanto. Internacia Lingvo. Plena lernolibro, kun antaŭparolo kaj du vortaroj. Prezo 10 kopkejoj. Varsovio. Presejo de Kelter. 1887' ... Mi aĉetis la libron kaj ekkuris hejmen, rapide por kiel eble plej baldaŭ tralegi ĝin. Komencinte la legadon, mi kvazaŭ frenezigiĝis; la tutan nokton mi pasigis apud la skribotablo, atentege legante kaj elegante paĝon post paĝo la admirindan libreteton.

"... Mi estis preta salti kaj danci, kvazaŭ frenezulo, kaj mia singardema kaj suspektema edzino serioze pensis, ke mi efektive frenezigiĝis: post kelkaj tagoj ŝi, nenion dirinte al mi, sekrete invitis mian konaton, d-ro Rozenson, por ke li esploru min. Tiu vizitito min, kvazaŭ hazarde ĵam vespere, sed post interparolo kun mi, kiam mi montris al li la broŝuron de d-ro Esperanto pri lingvo internacia kaj entuziasme klariĝis la signifon de tiu ĉi broŝuro, li ankoraŭ frenezigiĝis, ĉar post la vizito al mi li ekiris en la magazeno de Sirkin, aĉetis la saman broŝuron kaj komencis studi la lingvon internacian.' Poste li fariĝis bonega esperantisto ...

(Nun sekvas la rakonto pri la kunlaboro de D. kun Zamenhof kaj aliaj frutempaĵoj pioniroj. Lia unuaj provoj en la verkista kampo, kaj lia batalado kun la cenzuro pro tio).

How would you render these in Esp-o?
The argument will not hold water.
He resolved to turn over a new leaf.
You will think better of it afterwards.
It was indeed a storm in a tea cup.
He was greatly taken aback by the question.

I don't care a straw about what happens.

Leave no stone unturned to complete the work.

I make shift to have good clothes.
He showed great presence of mind.
I supposed he then popped the question to her.

SERIOZE KAJ SERCE.

"Gentilulo," diris la Duc de Morny, "estas tiu kiu aŭskultas kun intereso al aferoj pri kiuj li scias ĉion, kiam ili estas rakontataj de iu, kiu scias nenion pri ili."

"Ho, patrino," ekdiris la malgranda knabo ĉetale, kiam oni malkovris la gorgonzolan fromaĝon, "mi volas, ke mi estus surda kaj muta en mia nazo!"

Gasto: "Aŭskultu, kelnerino, tiu ĉi fiŝo tre malbonodoras."

Kelnerino: "Mi tion scias, sed, sinjoro, mi nenion al vi diris, por ke ne rompiĝu via apetito."

Bonkora preterpasanto (ĉe la marbordo): "Nu, mia vireto, ĉu vi konstruas kastelon?"

La "vireto": "Ne. Tiu ĉi estas hotelo; estas neniam da mono en kasteloj."

Libroamanto (konsternite): "Pardonu min, sinjorino, sed tiu libro, kun kiu vi fineto ludas, estas antikva kaj treege malofta unua-eldono."

Vizitanto: "Ho, ne gravas. Ne ĝenu vin. Ĝi amuzos ŝin tute egale kvazaŭ ĝi estus tute nova."

Iu demandas—Ĉu estas danĝere mangi antaŭ ol dormi? Ni pensas, ke ne. Ni ofte aŭdas pri homoj kiuj faras tion. Sed se vi timas riski ĝin, eble estus pli bone, se vi mangus post kiam vi estas ekdorminta.

Junulo nomita Roberto
Amunus fraŭdinojn kun sperto
Al knabin' li edziĝis
Dek idoj naskiĝis
Nun bedaŭras li pri sia lerto.

Cu Smit kaj lia nova edzino interaĝrablas:

Ho ĵest! Ŝi rigardas lin kiel grekan dion.

Cu ver? Sed Smit ne estas homo tre di-simila.

Eble ne. Sed ŝi metas antaŭ lin brul-oferaĵon ĉe ĉiu manĝohoro.

Knabino: "Ho, patrino, tiu estas belega libro; sed ĝi finiĝas tiel malĝoje.

Patrino: "Ĉu mia kara? kiel?"

Knabino: "Ĉar ŝi mortas, kaj li devas reveni al sia edzino."

POR LA VIRINOJ.

Du aspektoj de la virinoj.

1870 — "Junulinoj," diras Ruskin, "devus similaj lekantetojn, lekantetojn blankajn kaj ĉarmajn, kun rando de ruĝkoloro, se vi serĉe rigardas: lumigante la teron kie ajn ili estas: sciante simple kaj kviete ke ili tion faras, kaj ke ili devas tion fari, kaj ke estus tre malbone se ili ne tion farus. Kelkaj lekantetoj perdas siajn ruĝajn randojn kiam ili floras. Ĉi tiuj tute ne estas tiel belektaj kiel la aliaj. Sed, malgraŭ ĉio, ili estas lekantetoj, kaj neniu povas diri unu vorton kontraŭ ili. Kelkaj junulinoj ne estas tiel belektaj kiel aliaj. Sed malgraŭ ĉio, ili ja estas knabinoj, kaj ili devas esti agrablaj. Ĉiam ili estas tiaj, kvankam okaze oni ne rimarkas ĝin."

1932—Estas interese rimarki la mianteron en kiu la Rusa komunista registaro aranĝas pri la virinoj. En ĉiu virilato, la virino ricevas la saman egalan traktadon kiel la viro. Sociale, ekonomie, politike, ŝi estas lila egalulo. Se ŝi edziĝas, tiu fakto tute ne tusas ŝian ofcon. Se ŝi patrinigas, ŝi havas monatan libertempon antaŭ kaj post la nasko. Ŝi estas kuraĝigata lasi la infanon en publikaj infanejoj por ke ŝi povu labori ekster la hejmo, kaj sin liberigi de la ĉenoj de familia devo. Ŝi povas estri ĉian movadon aŭ firmo, same kiel la viro, ĉu estas inĝenieria aparato, registara fako, edukada departemento, aŭ eĉ la armeo mem. Kaj se ŝi perdis la registaron aŭ penas renversi ĝiajn projektojn, ĝi ŝin mortpafos kun ne pli da kompato ol ĝi montras al viro. (El la "Homaro Elradikigita" de Maurice Hindus.)

La Recepto

Fiŝa Pudingo El Svedujo

Prenu unu funton da kuirita blanka fiŝo, senigu ĝin de haŭto kaj ostoj; pecigu tri aŭ kvar uncojn de bovaja sebo, kaj pistu ĝin en pelvo. Al ĉi tiu aldonu la fiŝon kaj ankaŭ pistu. Tiam enmetu du uncojn da mola pano, antaŭe trempita en lakto. Pistadu ĝis la miksaĵo estas tute glata, aldonante da kirilantaj ovojn. Enmetu en pelvon kaj malsekigu per ne tute kvaronpajnto de lakto. Spicu per salo, pipro, kaj pecigita petroselo, kaj vaporumu dum unu kaj duonhoron. Servu kun ordinara blanka saŭco, kaj aspergu per iom da omara koralo laŭvole.

The more people you get to know about Esperanto, the more valuable the language will be to you.

RUGA POLVO.

(La sekvanta artikolo, el la melburna "Argus," pritraktas la aventuron de maljuna orserĉisto, Patrick Whelan, kiu asertis, ke li retrovis la Rifon de Lasseter (vidu "Suda Kruc" 1/10/32). Sindikato sendis Whelan per aeroplano, kun piloto kaj termezuristo, por trovi la rifon, sed la aeroplano devis alterĝi sur unu el la salaj lagoj priskribitaj en la sekvanta artikolo. Trovante, ke la aeroplano, pro difektoj, ne povis leviĝi de la koto supraĵo, kun la tri viroj, eĉ post kiam ili forprenis la provizaĵojn, k.t.p., Whelan elektis resti tie, dum la du aliaj revenos al Forrest por alvenigi helpon. Du militaj aeroplanoj vizitis lin kaj faligis nutraĵon al li, sed ili estis tro pezaj por riski la alterĝon. Post ok tagoj sola sur la sala lago, kun escepto ke kelkaj indiĝenoj, kiuj montris al li kie trovi akvon, Whelan estis fine savita per la unua aeroplano, kiun oni riparis kaj ekipis pri larĝaj radoj, por ebligigi pli facilan levigon.

"Malmola semo," liaj amikoj lin nomis. Li elpaŝis el la Adelaide-ekspresvagonaro ĉe Spencer-strato, kaj tiu marŝis al akvofonto. "Estas tiu ruĝa polvo," li klarigis, post longa trinkado. Li libertempe vizitas Melburnon post tridek jaroj kiel kontrolisto de brutbienego en la Musgrave-Montaro en Mez-Aŭstralio. "Mi plivole estus ĉi tie, ol kie tiuj orserĉistoj troviĝas, for en la centro," li diris. "La nuna tempo estas precize la malĝusta jartempo iri tien. La kamparo konsistas tute el ondanta sablo, kun iom da histrikerbo, kiu estas eĉ tro malmola por sidejo, kaj kelkaj argilgavoj, kiuj estas nudaj kaj malmolaj, sed tro perdidaj por aeroplano. Ankaŭ estas la salaj lagoj, Macdonald kaj ceteraj, sekaj kaj brilegaj blankaj. Kiam la riveroj fluas, eble unufoje ĉiujn sep jarojn, ili fluadas super la dezerton, kaj demetas siajn akvojn en malprofundajn kavojn, kie la suno sekigas ilin. Dum pluvriĉa sezono eble estas futo da akvo sur la koto, sed alfoje, la koto estas kovrita per dika salkrusto, kiun la riveroj estas elavintaj el la dezertsablo. Tiuj estas la lagoj.

"La argilgavoj? Nu, ili nur estas tiaj; neniu ŝajnas scii multon pri ili. Se oni fosas apud lago, la serĉota akvo estas: saturita de salo. Kaj varmegal..." Li englutis alian akvotrinkon. "Estas tiu ruĝa polvo," li reklaris kvazaŭ pardonpete.

"Viro sendube estas freneza iri serĉi oron tie, aeroplano," li diris. "Oni bezonas kamelojn, kaj eĉ tiuokaze oni povas veturi nur nokte, je tiu ĉi tempo de la jaro. La indiĝenoj ne ĝenos vin. La plej malbonaj el ili estas en mia regiono, kaj ĉiujfoje kiam ili estas atakintaj blankulon, estas la kulpo de la blankulo. Sed la varmego! Dekdu horojn sen akvo, kaj homo pereas! La haŭto kaj ungoj fendigas, kaj oni ne kuraĝas tuŝi metalon en la suno, ĉar ĝi brulektas la manon. Akvosakoj ne utilas—tro da forvaporigo. Dum ĉi tiuj monatoj la rapideco de la forvaporigo estas po tridek futoj jare; tio signifas, ke tia suno sekigus puton profundan je tridek futoj en la daŭro de unu jaro. La akvo forvaporiga eĉ tra lignaj bareloj. Kameloj ne povas kontraŭstari la varmegon de la tago; ili nur kuŝiĝas en la ombro de hastono kaj bakiĝas, ĝis plimalvarmigas. Mi kompatas tiun kompatindan, Patrick Whelan—kampeloĝantan tie sola sur la sala lago. Estas bona regiono en la vintro, eble en ĉiu sepa jaro sed nun..."

Pro tio, ke la akvo ne satigis lin, li direktis siajn paŝojn al la drinkejo. "Estas tiu ruĝa polvo," li diris denove.

PRI "REGMORTIGINTO."

Petas ulo, kiel traduki la anglajn "regicide" kaj "royal murderer"?

La unuan per "regmortiginto" (komparu: bestmortigist—slaughterman) aŭ "reĝon-mortiginto" (kp.: ĉionaciado, Sentenco 3/20) aŭ "mortiginto (mur-dinto) de reĝo; la duan per "mortiginta reĝo," "mortigulo reĝo." Ankaŭ oni povus skribi laŭ zamenhofa ekzemplo "reĝo-mortiginto," "reĝo-mortigulo." Se la reĝa persono ne estas reĝo, oni povus uzi "reĝfamilia mortiginto" aŭ "reĝrasa m." aŭ "reĝido-m." La formo "reĝa mortiginto" estas unuavide iom dubesena, sed laŭgramatike ĝi devas signifigi "regal" aŭ "royal" mortiginto, tio estas, "reĝo, kiu iun mortigas." Tio ĉi estas averto kontraŭ senpripensa kunmetado de adjektivoj kaj substantivoj, ĉar "regmortiginto" ne egalas "reĝa mortiginto." (Vidu tezon pri la substantiva ĉefelemanto verkitan de Kalocsay, "Lingvo Stilo Formo," p. 12/15).

JOAB ELIOT, avo, Konstancia civitano, naskiĝis angloinde, sukcesis fine alveni Konstancion antaŭmorte, ĝojos de ĉe tiu "Preternacio" korespondi kun alireganoj. Poŝtadreso laŭ 2 Cambridge St., WILLOUGHBY, N.S.W. (Aŭstralio).

MAIA IMPRESOJ PRI AŬSTRALIO.

(De L. Hlob, Millicent, Suda Aŭstralio)

Kelkajn jarojn antaŭ ol mi alveturis ĉi-tien mi aŭdis multon pri Aŭstralio. Samlandanoj, kiuj alveturis ĉi-tien, skribis hejmen pri siaj impresoj kaj spertoj. Ili pentris preskaŭ ĉion rozkolora ĉar kondiĉoj tiam estis bonaj. Ne estas mirinde, ke mi ekspiris vojaĝi al la bona lando. Kaj fine mia deziro efektiviĝis.

La unuaj ĝeneralaj impresoj estis tre bonaj. Grandaj urboj, kie la ŝipo haltis, ŝajnis belaj kaj puraj kaj la popolo prospera. Aŭtomobiloj ĉie en granda nombro. Mia vojaĝfino estis Melburno, kie mi pasis du semajnojn. La urbego tre plaĉis al mi. Sed pli multe plaĉis al mi Melburnaj samideanoj. Mi estis kortuŝita pri amikeco kaj bonveno inter ili.

Trovinte laboron en kamparo mi povis observi la naturon en Aŭstralio. Al ĝenerala aspekto de la lando kaj naturo mi alkitimigis nur post du jaroj. Unue ĉio ŝajnis fremda kaj iom prema. Okulo vane serĉis ĝis nun kutimajn abundajn riveretojn kaj lagojn, pinojn, kverkojn, betulojn, kaj aliajn arbojn kaj kreskaĵojn. Okulo nur trafas eŭkaliptojn kaj aliajn indiĝenajn arbojn kaj kreskaĵojn. Lagoj kaj riveroj estas ĉi-tie maloftaj kompare kun mia hejmlando. Plantaĵoj de pinoj nur memorigis min pri pinarboj de hejmlando. Bientero ankaŭ estas malsimila al Estonio. Unue: bienoj

ĉi-tie estas pli grandaj, kaj due: ili estas specialigitaj. Unu kreskigas tritikon ĉefe; alia avenon kaj hordeon ktp. Malofte oni vidas pli ol tri malsimilajn rikoltojn. Iuj havas nur herbejojn por ŝafoj kaj brutaro. En mia hejmlando bienulo havas proksimume 100 akreojn da lando meze, sed kreskigas almenaŭ ses rikoltojn, — herbejojn aparte. Estonia farmlando ŝajnas konsisti el multaj diverskoloraj flikaĵoj; dum ĉi-tie en tritiklando vi povas vidi milojn da akreoj de tritiko. La plej granda kampo kiun mi vidis estis de 5000 akreoj.

Dum malbonaj tempoj aŭ sezonoj Estonio bienulo havas sufiĉon por siaj bezonoj, ĉar se unu aŭ du specoj de rikoltoj malsukcesas, li ankoraŭ havas kelkajn aliajn kiuj ne malsukcesis. Ĉi-tie farmistoj vendas sian tritikon aŭ lanon kaj devas ĉion alian aĉeti. Mi vidis multe bienojn ĉi-tie, kiuj ne posedis aŭ legomĝardenon aŭ bovinon por lakto kaj butero aŭ fruktoarbojn. Ĉion oni devis aĉeti. En Estonio mi ne aĉdis, ke bienulo aĉetis panon, viandon aŭ legomojn kaj fruktojn por uzo sur bieno. Ili aĉetis nur sian maŝinaron kaj lastatempe ankaŭ vestojn, sed antaŭ dudek jaroj ili ŝpinis lanon kaj fiŝojn kaj faris ŝtofon por sia vestaro. Kompreneble aĵojn kiel sukero, tabako ktp, kion oni ne povas produkti sur bieno, oni devas aĉeti ankaŭ. Pro tio ke oni uzas maŝinaron ĉi-tie pli multe, oni povas plenumi laboron sur farmbienoj uzante, malmultajn laboristojn ol en mia hejmlando, kie oni uzas ankoraŭ falĉilojn kaj alian manlaboron. Oni

ne povas uzi maŝinaron tie tiom kio ĉi-tie pro malsimilaj klimataj kondiĉoj kaj ĉar landpecoj estas malgrandaj. Sed ili havas draŝilon komune.

Manĝo ĉi-tie estas pli bone preparata ol en mia lando, sed mi opinias, ke ĝi ne estas pli nutra. Saviĝando kaj teo por maten-, tag-, kaj vespermanĝo ĉi-tie estas ordinara afero. Oni diras, ke Aŭstralianoj estas la plej grandaj tetrinkuloj en la mondo, sed mi opinias, ke rusoj superas en tiu ĉi fako. Miriĝas min kial Aŭstralianoj ne trinkas pli da lakto. En Estonio bieno speciale, ĝi estas ĉefa trinkaĵo. Ĝi ja estas bona kaj tre nutra trinko! Konfitaĵojn kaj marmeladojn oni manĝas ĉi-tie grandkvante kaj eble tio estas la kaŭzo de granda nombro da falsaj dentoj.

Rimarkindaj ĉi-tie estas senfajlaj ferfadenbariloj kaj pensigas novalveninton pri la grandega kvanto de laboro, materialo, kaj mono elpezita. En mia lando vi ne vidas ferfadenbarilojn. Ne estas tre multe bariolojn tie—ĉefe ĉirkaŭ legomĝardenoj kaj fruktarbejoj: Terpeco de unu bienulo estas apartigita de tiu de najbaro per fosaĵo aŭ markoj de termezuristo. Oni tie ne bezonas bariolojn tiel multe ĉar knabo aŭ knabino gardas ŝafojn kaj bovinon; kaj tie ne estas kunikloj—tiu malbena por aŭstralia bienulo kaj beno por kaptisto (kiam unu funto da peltoj valoras kvar ŝilingojn). Mi ankaŭ benis ilin kiam mi ricevis unu ŝilingon por unu pelto kaj malbenis post kiam ili invadis mian legomĝardenon kaj tial igis min stargi rebarilon (funto da peltoj kostis tiam nur 6p.).



VIA LASTA SANCO!!!

BECOME A MEMBER OF THE ASOCIO DE
ESPERANTISTAJ LIBRO-AMI KOJ (AELA).

Six recently published or to be published books in
master-style Esperanto at a fourth of the published prices.
Write for FREE prospectus, obtainable from—

THE MANAGER, "SUDA KRUCO,"

P.O., BOX 731F, MELBOURNE.

Interesa kaj iom amuza estis unue vidi kiam laboron viroj faras ĉi-tie. Ekzemple: melkado. Tio estas ĉefe virina laboro en Estonio. Mi ne antaŭe vidis viron melkanta. Ree, helpado kun lavado de pladoj kaj potoj, ĉe lavado de tolaĵoj ktp. Mi estis ekstreme surprizita kiam mi vidis edzon-bienulon, kiu mi laboris, lavanta, kaj kiam li vidis miajn grandajn okulojn, diris:—“Ĝi estas tro malfacila laboro por edzino.” Mia miro estis komprenebla, ĉar mi vidis nenion similan antaŭe. Hejmlande en kamparo virino laboras tiel forte kiel viro, kaj ne pensas tian eksterordinara. Ŝi uzas falĉilon, rastilon same kiel viro, konstruas fojnostakon ktp. kaj ne plendas, ke viro ne helpas lavi kaj sekigi la telerojn kaj potojn.

Pro pli bonaj ekonomiaj kaj klimataj kondiĉoj oni ne laboras tiel forte, kiel en Estonio, kaj tial al mi ŝajnis unue ke Aŭstralianoj ne estas bonaj laboristoj. Poste mi trovis, ke ili estas bonaj je peclaboro, sed je taglaboro—speciale Ĉtata laboro—ili pensas pli longigi laboron “prenante aferojn facile.” Mi vidis tian laborante du vintrojn en ŝtata pinarbaro. Mi konsideras tion kiel ĉefa kaŭzo, ke oni ne povas ekspluati la arbarojn profite. Peclaboro, inf-^{er}opinas: estas—la plej justa kie ajn tio estas ebla, ĉar tiam ĉiu estas pagita laŭ siaj meritoj. Estas malfacile imagi kiom da ŝafoj oni tondus dum laborotago se la laboro estus pagata potage. Mi pensas, ke neniu penus tondi pli ol 100, kvankam tondisto povus fari pli ol 200 ŝafojn dum laborotago. Parolante pri ŝaŭfondado mi devas noti, ke tio ankau estas virina laboro en mia hejmlando. Feliĉe pro virinoj tie ne estas multe da lanuloj kaj ĉiu tondas nur proprajn siajn.

Ĝenerale mi trovas Aŭstralianajn bonkoraj kaj helpemaj. Kaj ĉi tio pruviĝas, ĉar niĵoj survoje marŝantaj senlaboruloj ne malsatas. Kiam ofendita, Aŭstraliano estas facile preta por pugnobatalo, kiun mi konsideras ne tro bona fraĵto, ĉar ofte ofendito estas tiu kiu ricevas punbatadon. Sed estas bone, ke post batalado ili manpremas kaj ĉajne forgesas la aferon. En mia lando oni ne batalas tiel facile, sed kiam oni komencas ĝin la afero estas pli serioza,—oni ne estas kontenta kun pugnoj nur, sed io, botelo aŭ ia alia objekto taŭgas por la batalantoj kaj oni ne forgesas tion tiel facile. Aŭstralianoj ŝajnas forgesi pli facile mala-

grablaĵn aferojn kaj estas pli optimistaj ol miaj samlandanoj. Ŝajnas ke ili estas iom tro senĝenaj kaj la estonteco ne zorgigas ilin tiom kiom miajn samlandanojn. Mi konas multajn bienulojn ĉi-tie kiuj estas en ŝuldoj ĝis kolo, sed notante ilian vivon laŭ ekstero, oni povas opini, ke ili estas tre prosperaj.

Grava makulo ĉi-tie estas troa uzado de slango, sed al tio oni baldaŭ alkitimigas. Ankaŭ vetadon je ĉevaloj oni ne povas nomi virto, kaj mi opinias, ke oni elspesas tiom je vetado kiom je drinkado.

Fine mi povas diri, ke Aŭstralio havas pli bonajn kondiĉojn kaj ŝancojn por bona vivo kaj prosperigo ol mia hejmlando, kaj mi ne bedaŭras, ke mi alveturis ĉi-tien—kvankam mi trafis malbonajn kondiĉojn.

Bedaŭras mi nur, ke mi komencas forgesi Esperanton pro manko de praktiko, kaj tio estas malbona.

EDZIGMOROJ IDEALAJ.

La sopiro de civilizitino.

Antaŭ ne longe venis en mian manon libro kiu traktis pri la edzigmoroj de iu indiĝena raso, mi ne scias kiu aŭ kie, ĉar mi tiel interesiĝis pri la moroj, ke mi tute forgesis rimarki la landon kie oni praktikis ilin. Ŝajne en ĉi tiu lando la virinoj elektas la edzon, faras la amindumadon, ĉasas la kompatindulon en la arbaron, kaj, rifuzante aŭdi nean respondon, fine kaptas lin kaj triumfe lin forportas. Mi povas aŭdi cinikan viran voĉon dirantan ke ĉi tio ne multe malsimilas la metodon de la civilizitaj fraŭlinoj: sed la diferenco vere estas granda. En tiu ideala lando, kiam junulino evidas sian sorton, ŝi sendas al lia fratino donacon (rimarku, mi petas, la subtilon de tiu movo: ĉu ne estis franca filozofo kiu diris, ke se vi volas oni el la societo, amikigu la virinojn?). Tiam, kiam la donaco estas akceptita, ŝi eksendas al la junulo nutraĵon kuiritan de sia propra mano. Sed la junulo, kun laŭdinda zorgo, ne manĝas ĝin: ŝajne, kiam li vidas la unuan pladon, li forkuras en la arbaron kaj rifuzas esti eltirita: kaj la familio formangas la nutraĵon. La junulino ren sendas: ree la familio ĝin manĝas. Mi ne scias, ĉar la libro ne diras, kio okazas se la fraŭlino estas malbona kuiristino: ĉu la familio oferas sin sur la altaro de devo ĝis sia tuta digesto estas ruinigita preter ripareblo? aŭ ĉu ili donas la manĝaĵon publike kaj ceremonie al la urb-almozuloj kiel suges-

teton ke la amantino transdonu sian amon al iu havanta pli fortan stomakon? Mi ne povas diri: sed la kuirado estas bona, ŝajne la familio manĝadas dum tiom da tempo kiom la amfreneca fraŭlino konsentas ilin nutri; pasdirente, oni povas vidi ke familio kiu enhavas kelkajn ilojn povas vivi preskaŭ senkoste, dum fakte multaj filinoj malriĉiĝus ĉe la plej gravan kokosmagnaton; sed ĉio trovas sian finon: baldaŭ la pacienco de la junulino maldikiĝas, kaj la familio malĝaje komprenas ke la senpagaj manĝaĵoj certe ĉesos se ŝi ne ricevos respondon.

Do ili iras al la arbaro, kaptas la junulon vole-nevole, kaj la edziĝo soleniĝas, ĉu laŭ lia konsento aŭ ne, la libro ne klarigas. Sed la legado donis al mi kelkajn ideojn: Mi estas sufiĉe bona kuiristino: ĉu elekti unu el miaj konatoj kaj sendi al li ekzemplerojn de mia lerteco? Certe ne estas arbaro en kiu li povas sin kaŝi: sed aliflanke, kiam garantian mi havas ke li, formangante ĉion, konsentus edziĝi kun mi? Ne! Post pripensado mi uferas ŝpari mian monon kaj laboron, kaj fidi al mia natura ĉarmo.

—E.G.

(Ĉu ne vere, ke ankaŭ la blankulaj amdelirantaj inoj foje donacas al la celata sinjoreto frandaĵojn, ĉe vestojn, por ke li pli dezirene direktu al ŝi la rigardojn? Red.)

LA EDZINO DE LA BRUTARPELISTO (daŭrigata).

De tempo al tempo la virino formetas sian laboron kaj rigardas, kaj aŭskultas, kaj pensadas. Ŝi pensas pri aferoj en sia propra vivo, ĉar estas tre malmulto por pripensi.

La pluvo kreskigos la herbon, kaj ĉi-tio memorigas ŝin pri la tempo kiam ŝi batalis kontraŭ arbarfajrego, kiam ŝia edzo estis for. La herbo estis longa, tre seka; kaj la fajro minacas la domon. Ŝi surmetis malnovan pantalonon de sia edzo, kaj elbatis la flamojn per verda branĉo, ĝis grandaj gutoj de fulga ŝvito elstaris sur sia frunto, kaj malsuprenkuris en strioj sur sia nigriĝintaj brakoj. Vidi lian patrinon en pantalone trege amuzis Tommy, kiu laboris kiel malgranda heroo ĉe ŝia flanko, sed la terurita infaneto kriis forte por sia “panjo”. La fajro estus venkinta ŝin, se kvar ekscititaj kamparanoj ne alvenus surĉevala ĝus-kateno. Estis granda miksaĵo: kiam la fajro por levi la infaneton, li kriis

POR LA KOMENCULOJ.

LA TRI MALLABOREMULOJ.

Iu reĝo havis tri filojn, kiujn li amis egale bone; tiel ke li ne povis decidi, kiun el ili sekvis lin kiel reĝo, kiam li estos mortinta. Kiam alvenis la tempo ke li mortu, li alvokis ilin al sia lito, kaj diris, "Miaj karaj infanoj, fine mi estas elpensinta projekton, kiun mi efektigos. Jen ĝi estas. Kiu ajn el vi povos puri al mi, ke li estas la plej mallaborema el la tri, estos la reĝo post mi."

Tiam diris la plej aĝa filo: "Patro, la regno jam estas la mia. Mia estas tiel mallaborema, ke kiam mi sidas apud la fajro por varmigi min, pli vole mi lasus brulvundi al mi la kalkanojn ol ĝenuŝ min retiranĝe ilin de la fajro."

La dua diris: "Patro, la regno apartenas al mi, ĉar mi estas tiel mallaborema, ke kiam mi sidas apud la fajro por varmigi min, pli vole mi lasus brulvundi al mi la kalkanojn ol ĝenuŝ min retiranĝe ilin de la fajro."

Sed la tria diris, "Patro, la regno jam estas la mia, ĉar ĉe se mi estus pendigota, kaj havus la ŝnuron ĉirkaŭ la kolo, kaj iu donus al mi akran tranĉilon kaj dirus al mi ke mi tratanĉu ĝin, mi plivolus esti pendigota ol levi la manon ĝis la kolo!"

Kiam la patro aŭdis tion ĉi, li diris, "Vi estas la plej mallaborema, mia filo, kaj tial la regno apartenas al vi!"

THE THREE LAZYBONES.

A certain king had three sons whom he loved equally well, so that he could not make up his mind which of them should succeed him as king when he was dead. When the time came for him to die, he called them to his bedside and said, "My dear children, I have at last thought of a plan which I will carry out. It is this. Whichever of you can prove to me that he is the laziest of the three, shall be king after me."

Then said the eldest son: "Father, the kingdom is mine. I am so lazy that when I lie down to rest, even if something were to fall into my eyes, I would not shut them, though in doing so I might go to sleep."

The second said: "Father, the kingdom belongs to me, for I am so lazy that when I sit beside the fire to warm myself, I would rather burn my heels than take the trouble to draw back my legs."

But the third said, "Father, the kingdom is mine, for even if I were about to be hanged, and someone gave me a sharp knife and told me that I might cut it through, I would sooner be hanged than raise my hand to my neck."

When the father heard this, he said, "You have gone the farthest, my son, and therefore the kingdom belongs to you!"

Melbourne Esperanto Club.—Meets every Wednesday, 8 p.m., in Australian Church Hall, Russell Street, Melbourne. Tuition, classes, conversation, etc. Secretary, Mr. R. Rawson, 169 Exhibition Street, Melbourne.

Western Esperanto Society. Perth, W.A. kunvenas ĉiusemajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth. Komunikadojn al la sekretario.

Masterston Esperanto Club — Meet every Tuesday at 8 p.m. in the Y.M.C.A., Church-st., Masterston. Hon. President, Mr. G. R. Sykes, M.P.; Prezidento, Mr. A. Dewar D.B.E.A.; Vice-Presidents, Mrs. McNab and Mr. B. Johns; Secretary, Mr. Howard Franks, 38 Workshop-rd. Visitors always welcome.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas ĉiutage je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario: s-ro C. Brandon. Komunikadojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A.; Vice-President, Mr. E. C. Jack; Secretary, Miss G. Carty, 33 Tanera-cr., Brooklyn; Treasurer,

Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.

Melburna Esperanto-Societo. Prezidanto, sinjoro P. Hudson; sekretario, i-ino L. Irwin, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunveno: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 18ja horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: s-ro A. W. Peacock; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbane Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: s-ro F. T. Simon. Viceprezidantoj: s-roj H. Hutton kaj S. Parry. Bibliotekisto: Oskar Behncke (Del. U.E.A.). Sekretario: fratino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Queensland).

Coburg Esperanto-Grupo—Kunvenas ĉiutage je la 8a vespere ĉe la Labour Hall, Sheffield-st., Coburg (malantaŭ Grand Teatro). Prezidanto, s-ro E. Williams; sek., A. W. Spencer, 48 Munro-st., Coburg. Vizitantoj ĉiam bonvenigitaj.

kaj baraktis konvulsie, pensante ke ŝi estas "nigrlino," kaj Aligatore, fidante pli al la prudento de la infano ol al sia propra instinkto, atakis ŝin furioze, kaj (estante maljuna kaj iom surda) en sia ekscito, ne en la komenco rekoni la voĉon de sia mastro, sed tenegadis la ĵustenan pantalonon ĝis Tommyj forpelis ĝin per sermimo. La sinriproĉo de la hundo pro sia eraro, kaj ĝia zorgo sciigi al ĉiuj ke estas granda eraro, estis tiel evidenta kiel ĝia ĉifona vosto kaj dekludu-cola rideto povis montri. Estis glora tempo por la knaboj; tago rememoriginda, pripensinda, kaj priindinda dum multaj jaroj.

Ŝi pensas pri la maniero laŭ kiu ŝi batalis kontraŭ superakego, dum for-estis ŝia edzo. Ŝi staris dum horoj en la torenta pluvego, kaj fosis detruojn deflulon por savi la digon trans la rivereto. Sed ŝi ne povis savi ĝin. Estas aferoj kiujn kamparviro ne povas fari. La proksiman matenon la digo estis rompita, kaj ŝia koro preskaŭ rompiĝis ankaŭ, ĉar ŝi pensis pri la sentadoj de sia edzo, kiam li revenos hejmen kaj vidalos la rezultaton de laboraj jaroj forbalaita. Ŝi ploris tiam. (Daŭrigota.)

KVAKERISMO KAJ PACO.

Mi havas senpagajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj paco por disdoni. Bonvole petu per ilustrita poŝtkarto aŭ letero al:—D-ro Fred J. Williams, Samarai, PAPUA. (fratorganoj bv. represu.)

Next number scheduled for May 5.

Wholly set up and printed in Australia by the Triumph Press, Surrey Hills, Victoria.